KOMPLETA GRAMATIKO DE LA TUPIA LINGVO

Eldona Konsilantaro

Dr. Alessio Giordano (Univ. de Pavia, Itália)

Profª Drª Alessandra Madella (Univ. de Zaozhuang, Rep. Popular da China)

Prof. Dr. Arikapali Giridhar Rao (Univ. de Hyderabad, Índia)

Profª Drª Christina Bielinski Ramalho (Universidade Federal de Sergipe – UFS)

Prof. Dr. Fábio Fortes (Univ. Federal de Juiz de Fora – UFJF)

Prof. Dr. Leonardo Ferreira Kaltner (Univ. Federal Fluminense – UFF)

Prof. Dr. Luiz Fernando Dias Pita (Universidade do Estado do Rio de Janeiro – UERJ)

Prof. Dr. Fabrício Possebon (Univ. Federal da Paraíba – UFPB)

Prof. Me. Giacomo Comincini (Univ. de Pavia, Itália)

Prof. Dr. Guilherme Fians (Univ. de Saint Andrews, Escócia)

Profª Drª Isabel Arco Verde Santos (Universidade do Estado do Rio de Janeiro – UERJ)

Profª Drª Ilona Koutny (Universidade Adam Mickiewicz, Polônia)

Prof. Dr. Ivan Eidt Colling (Univ. Federal do Paraná – UFPR)

Prof. Dr. José Leite Júnior (Univ. Federal do Ceará – UFC)

Prof. Dr. Nataniel dos Santos Gomes (Univ. Estadual do Mato Grosso do Sul – UEMS)

Prof. Dr. Sajal Dey (The English an Foreign Languages University, Hyderabad, Índia)

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

KOMPLETA GRAMATIKO DE LA TUPIA LINGVO

kun aldonaj Eseoj pri la Indiĝenoj kaj Tupia Antologio

Redaktis
Fabricio Possebon kaj Luiz Fernando Dias Pita

easp

Sanpaŭlo, 2026

Enpaĝigis: José Roberto Tenório
Eldonis: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo - Sanpaŭlo, 2026 (2-a eld.)
Presis: fabricadolivro.com.br

Nia danko al S-ro Wladimir Lorenz, kiu donis permeson por publikigado.

Ĉi tiu verko estas uzebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Tutmonda, kun atribuo, sen modifo kaj por nekomerca uzo (CC BY-NC-ND 4.0), disponebla ĉe: *https://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/4.0/deed.eo*

© Francisco Valdomiro Lorenz (aŭtoro)
© Luciana Terezinha Novinski (artikolo: paĝoj 11-16)
© Luiz Barbosa da Silva (traduko: paĝoj 25-40)
© Fabricio Possebon (artikoloj: paĝoj 41-48, 143-183)
© Luiz Fernando Dias Pita (artikoloj: paĝoj 49-67, 121-139)

L8692k

LORENZ, Francisco Valdomiro.
kompleta gramatiko de la tupia lingvo kun aldonaj eseoj pri la indiĝenaj kaj tupia antologio / Francisco Valdomiro Lorenz; Fabricio Possebon; Luiz Fernando Dias Pita. – 3ª. eld. – Sanpaŭlo : Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, 2026.
184 p. – 23 x 16 cm.

ISBN 978-85-67422-33-6

1. TUPIA LINGVO 2. GRAMATIKO I. POSSEBON, Fabricio, *comp*. II. PITA, Luiz Fernando Dias, *dic. e ens.* III. Titolo.

CDD 415

Kataloga slipo pretigita de Neide Ap. de Freitas – CRB-8/9091.

ENHAV-TABELO

Plano de la Verko: Kelkaj Klarigoj 07
Fabricio Possebon

Francisco Valdomiro Lorenz – Saĝa Homo 11
Luciana Terezinha Novinski

UNUA PARTO

Klasifiko de la Brazilaj Indiĝenoj 17
Indiĝenamerika Pensmaniero 25
Francisco Valdomiro Lorenz

La Tupia Lingvo 41
Fabricio Possebon

La Influo kiun oni ne Emas Agnoski 49
Luiz Fernando Dias Pita

DUA PARTO

Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo 69
Francisco Valdomiro Lorenz

Antaŭparolo 71
La Sonoj 73
La Akcento 76
Pri la Substantivoj 77
Pri la Adjektivoj 80
La Pronomoj 82
Pri la Verboj 85
Neigo 93

95 Demando
96 La Verbo “Esti”
98 Verboj Pasivaj kaj Refleksivaj
100 La Numeraloj
101 Adverboj
103 Konjunkcioj
104 Interjekcioj
105 Postpozicioj
108 Pri la “Transiroj” ĉe Aktivaj Verboj
110 Rimarkoj pri la Verboj
112 Verboj Neregulaj
114 La Sufiksoj: Tyba, Pora, Gŭara
115 Pri la Sanĝo de Komenckonsonanto
117 Pri la Sintakso
119 Pri Kunmetitaj Vortoj

121 **Vortareto Tupia-Esperanta**
Kompilis Luiz Fernando Dias Pita

TRIA PARTO

141 **Tupia Antologio**
Kompilis Fabricio Possebon

143 Preĝo
147 Amkanto
151 Laŭdo
159 Parolado
169 Fablo
175 Letero
178 Dialogo
181 Liriko

PLANO DE LA VERKO: KELKAJ KLARIGOJ

Prof-ro D-ro Fabricio Possebon
Federacia Universitato de Paraíba
Brazilo

Tiu ĉi *Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo* estas la lasta verko de profesoro Lorenz ne ankoraŭ publikigita, en kaj pri Esperanto. En la portugala lingvo restas tamen dekoj da aliaj verkoj.

Mi havigis al mi kopion de la tajposkripto, grandanime senditan de Luciana Terezinha Novinski, Direktorino pri Kulturo de la komunumo de Dom Feliciano, ŝtato Rio Grande do Sul. Kune kun la teksto venis permeso por publikigado, donita de unu el la heredantoj de profesoro Lorenz, s-ro Wladimir Lorenz, lia nepo. Tiu ĉi eldono estas tute senprofita, kaj celas la plifortigon de nia esperanta universala kulturo.

La plano de la verko estas triparta: la ĉefa parto estas la dua, tio estas, la tupia gramatiko mem. Mi perkomputile tajpis la tekston aldonante etajn klarigajn notojn. La originala tajpado de profesoro Lorenz estis farita per skribmaŝino. La stato de lia teksto estas bona, fakte perdiĝis nur malmulte. Mi ne sukcesis trovi informojn pri la jaro kiam li finpretigis tiun ĉi verkon, tamen mi supozas la dudekaj aŭ tridekaj jaroj de la pasinta jarcento[1]. La ilustraĵoj de la dua parto venis el la verko de Hans Staden, publikigita en Germanio en 1557. Ĝia titolo estas longa, sed la tradukoj plejofte simpligas jene: *Du vojaĝoj al*

[1] La malfacileco pro skribiloj estis malgrandigita nur en 1926, kiam Lorenz povis aĉeti skribmaŝinon el firmomarko Smith Premier. Tio faciligos lian laboron. Ĉar ne estis en la kolonio São Feliciano lernejoj de tajpado, li senprokraste ektajpis per nur du fingroj, kaj faradis tion tiel lerte, ke oni povis lin kompari, laŭ tekstorganizado kaj rapideco, kun profesia tajpisto". LEAL, José Carlos. *O Homem que Sabia Demais*. Riodeĵanejro: Societo Lorenz, 2008, pĝ. 50 kaj 51.

Brazilo. Staden estis maristo kiu dronis apud la brazila marbordo kaj estis arestita de la indiĝenoj tupinambaaj. La tekstoj akompanantaj la ilustraĵojn estas miaj. Ili estas skribitaj laŭ la klarigoj de Hans Staden kaj celas montri laŭeble kulturajn indiĝenajn morojn tiutempajn. Por riĉigi la materialon, Prof-ro Luiz Fernando Dias Pita aldonis vortareton tupian-esperantan.

Al mi ŝajnis ke publikigado de nura gramatiko, sen pliaj informoj pri la indiĝenoj, estus granda limigo por la leganto, ĉar li ne facile trovus en Esperanto iun ajn aldonan materialon. La unua parto do celis doni la minimuman scion pri la indiĝenoj kaj iliaj kuntekstoj en Brazilo. Krom mia propra artikolo, publikigita antaŭe en *Scienca Revuo* en 2007, kaj la artikolo de Prof-ro Luiz Fernando Dias Pita pri la influo de la indiĝenaj lingvoj sur la eŭropajn, la aliaj ĉapitroj venis el la plumo de profesoro Lorenz. "Klasifiko de la brazilaj indiĝenoj" estis originale verkita en Esperanto. Mi prenis ĝin el la verko *La Brazilaj Aruakoj*, publikigita en 1983, tamen, oni ne scias kiam li verkis ĝin. La aliaj ĉapitroj venis el *A Mentalidade Ameríndia* (*Indiĝenamerika Pensmaniero*), publikigita originale en la portugala lingvo en 1938. Oni do ne forgesu ke tiuj ĉi informoj pri la indiĝenoj ne estas novaj, tamen mi volis doni la penson de profesoro Lorenz pri la temo, kaj krom tio, tiuj du verkoj supre cititaj estas malfacile troveblaj nun.

La lasta parto estis elpensita por ke la leganto povu iomete apreci la tupian lingvon. Gramatiko ne estas metodo de lingvo. La leganto ne kapablos flue legi la antologion post la gramatika studo, tamen, pere de la traduko, kiu celis esti kiel eble laŭlitera, li povos almenaŭ sekvi la originalon. Mi aldonis tekstojn de profesoro Lorenz meze de la tria parto, por riĉigi la materialon.

Prof-ro D-ro Luiz Fernando Dias Pita, el Ŝtata Universitato de Riodeĵanejro, reviziis la tuton, tamen ia ajn eraro restas sub mia respondeco.

Fine mi volas per tiu ĉi laboro omaĝi al profesoro Lorenz, al kiu mi ŝuldas mian unuan esperantan scion. En la okdekaj jaroj mi eklernis per lia metodo *Esperanto sem Mestre*[2].



[2] LORENZ, Francisco Valdomiro. *Esperanto sem Mestre* [Esperanto sen Instruisto]. Riodeĵanejro: FEB, 1946. Pluraj eldonoj. Plibonigita de Prof-ro Porto Carreiro Neto.